

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



La
meznokta
suno.

El la lando tie en la plej norda nordo, "tie, kie finiĝas la mondo." (Vidu artikolojn de Dro F. Szilágyi en februara kaj marta n:ro de Sveda Esperanto-Gazeto.)

N:r 3.
N-o 3.

Mars 1934.
Marto 1934.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.

Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.

Lösnummer 025.

Annonspris: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.

Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.

Postgirokonto N:r 2012.

Arsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.
Telefon: Huddinge 279.

Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.

Postgiro 515 11.

Avd. för examens- och språkfrågor: Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.

Sekr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-
gatan 41, Göteborg.

Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-
gatan 61, Göteborg.

Arsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Praktisk lärobok i Esperanto för kurser och självstudium. Rik på förklarande exempel. 2:—

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. .. 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirklar. Av Jan Masiak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov.-adj. Nils Nordlund. 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturlärobok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. För tillf. slutsåld.

Esperanto-Ordbok. Av N. Nordlund. 1:—

Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.

Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Letero de tie, kie finiĝas la mondo.

F. SZILÁGYI

(Komenciĝis en febr. n-ro.)

»Maljuna» estas jam la vespero, kiam ni reveturas aŭtobuse al Kiruna. Jes, vespero posttagmeze je la kvara horo. La vojo de la aŭtobuso gvidas sur la glacio de la rivero. Pli kaj pli proksimiĝas la plej norda sveda urbo kaj super la riĉaj ferminejoj, sur la montoj duoncirkle lumas la elektraj lampoj, mistere, fee, pli kaj pli triumfante, venkante la facilan vesperan nebulon. Tiuloke, kie nun tiu ĉi urbeto aspergas la brilon de sia, antaŭkuranta kulturo, kvardek jarojn pli frue staris nur unu lapontendo. Sed poste okazis la malkovro, venis la okcidenta homo kaj la »uldra»-aro (la montspiritoj de la laponoj) vekite kaj venkate ŝtelkuris norden, pli norden. Ĉar la uldroj ne vidas dumtage, nur en la mallumo kaj laŭ la ĝisnunaj atestoj, ili ne tro toleras la elektran lumon. Kaj murmure for-amblis la Urso kaj krie forkuris la Lupo kaj la mejlopaŝantaj piedoj de la Gigantoj faris tri-kvar paŝojn al la virga Nordo.

Hejme, en Hungarlando mi imagis, ke ĉi tie, en Kiruna, la homoj senescepte vivas en tendoj, kaj mia esperantista amiko, devis esti kompreneble nur escepto, certe la sola homo, kiu portas eŭropan veston anstataŭ la fok-felo. Kaj nun mi staras en la mezo de la urbeto kaj mi devas honti pro mia nescio. Kie mi konjektis tendojn, tie mi vidas beligan lernejon, eble la plej modernan ler-

nejon de Eŭropo. Nur kelkaj, mallongaj datoj: 30 metrojn longa gimnastikhalo, kun parkedplanko, kaj tegita tenisludejo. Se oni premas butonon, elektra forto levas muron kaj dividas la halon en du partojn. Post la gimnastiko la infanoj iras en la duŝejon, kies modernecon mi devus laŭdi ne nur en lernejo, sed ankaŭ en vaporbanejo. Diversaj laborejoj, kuir-ejoj por la infanoj. Ĉiu studobjekto estas senpaga. La knabinoj ricevas senpagan ŝtofon por la kudrado kaj poste ili povas hejmenporti la pretajn vestojn. Mi vidis en la lernejo dentkuracejon, modernegan, kie du kuracistoj ĉiutage kvin horojn prizorgas la dentojn de la infanoj. Tiu ĉi lernejkulturo rezultigas tion, ke la sveda laboristo estas la plej kulturita, preskaŭ mi diris, plej aristokrata laboristo de Eŭropo kaj mi jam ofte surpriziĝis vidante en laboristaj loĝejoj grandajn kaj altvalorajn libroamasojn. Ĉi tie en la nordo de la nordo la loĝejoj estas plenaj de floroj, komforto, tekniko, kulturo, kien ajn ni rigardas.

Post la laponhejmo mi vizitis la beligan maljunulhejmon de Kiruna. La komforto, eleganteco post la laponhejmo jam plu ne povas esti surprizo. Ĉiu maljunulo havas apartan radioaparaton kaj unu el la maljunuloj kutime frapadas sian skribmaŝinon. (Sed vere, pli surprizis min tiu samideano, arbhakisto, kiu dum la somero promesis al mi leteron, sed nur tiam, se li ne laboros en la arbaro, ĉar tien li ne povas kunporti sian skribmaŝinon. — En nia lando, laŭ mia scio ne estas eĉ unu arbhakisto, kiu havas skribmaŝinon.) La maljunulhejmo en Kiruna havas ĉarman kutimon. Ĉiu maljunulo rajtas ne nur mem trinki trifoje la nacian svedan trinkaĵon, sed krome ili rajtas je la kosto de la maljunulhejmo regali per kafo ankaŭ siajn gastojn.

Ĉi tie en Kiruna estas la plej norda tramveturilo de la mondo, kompreneble kun hejtitaĵoj kaj — kiu estas la plej granda miraklo — oni veturas *senpage* en tiu ĉi tramo. *Eble la sola senpage tramo en la mondo.*

En la poŝtkontoro mi havas aferon. Elvenante mi devas konkludi, ke mi estas tamen en la nordo, ĉar miaj piedoj sur la faliga neĝo elflugas kaj mi preskaŭ elegante kisas la neĝon. Pridubinde, ĉu mi povis konservi mian mezeŭropan dignon dum la falo. En la sekva minuto nova akcidento! Mia malbone remetita leterujo elfalas el mia poŝto, kaj la gaja rikananta vespera vento feliĉe kunportas miajn paperojn. La ĉasado ŝajnas esti senrezulta, senespere kaj senspire mi rigardas post miaj paperoj, sed post tri minutoj mi konvinkiĝis ke en Svedlando ne nur la homoj, sed ankaŭ la elementoj estas ĝentilaj. La vento turniĝas kaj post tri minutoj ĝi alportas kaj metas antaŭ miajn piedojn dek ses paperojn, notojn kaj dokumentojn.

Kaj ankoraŭ unu neforgesebla travivaĵo. Mi vojaĝas al Narvik, al la norda urbo de Norvegujo. Kun la permeso de la fervoja estraro mi sidas sur la elektra lokomotivo kaj Laponlando, kiel belega filmo aperas antaŭ miaj okuloj. La trajno kuregas sub kaj preter grandegaj montoj, abiaro kaj — miraklo de mirakloj — kelkaj hejmlandaj konatoj, kelkaj obstinaj kaj kuraĝaj betuloj kaj kie jam ĉio ĉesas vivi, mire mi gapas al du amemaj pigoj; — ili venas post kaj trans la homoj, diras la amikema kaj tre inteligenta lokomotivestro. Ni kuregas apud la neĝa rubando de la Torne-marĉo kaj poste sub ni en la kaptorna profundo, sen glacio, ondoplene aperas la malluma fjordakvo de la Atlantika oceano. Ni alvenis Narvikon, la belegan norvegan urbeton.

— ★ —

Flera oficiella Esperantobrevkort.

Generaldirektionen för post och telegraf i Brasilien har nyligen utgivit en serie oficiella vy-brevkort med text på esperanto. Brasilien är det tredje landet i världen, som utger sådana kort. Tidigare ha Ungern och Lichtenstein utgivit sådana kort.

Sveda Antologio.

Kun sentoj de sincera dankemo la memelektita komitato por Sveda Antologio ricevis de tempo al tempo novajn pruvojn de sindona oferemo kaj energia lerta laborado por la komuna celo. Nun, duonon jaron post la disdono de la taskoj, kuŝas antaŭ ni zorge faritaj tradukaĵoj, kiujn ni legis kun ĝoja fiero, kiam ni trovis ke en Svedujo kreskas tiom granda nombro de vere lertaj tradukistoj. La ĝojo grandiĝis je la laŭdoj de la ne svedaj juĝintoj, kiuj sub la plimulto skribis: nepre presota! kaj bonega!. eĉ belega traduko! Dankas al vi la sveda esperantomovado kaj — ni povas tion, antaŭdiri — la tutmonda.

Ĉar la proponita materialo estas trioble pli granda ol la presota — por ke elekto laŭ la gusto de la nesvedaj juĝantoj povu okazi — multaj tradukaĵoj ne trovos lokon en la Antologio, kaj la nomojn de la tradukintoj ne aperos tie. Al tiuj ni aparte dankas kaj petas ilian permeson uzi la tradukojn por la kluboj en kaj eksterlande, kaj por presado posta. Ili ja ricevos la originalan tradukon, sur kiu ofte staras proponojn por ŝango aŭ plibonigo.

Tie ĉi ni volas mencii, ke kelkaj tre novaj esperantistoj surprizigis nin per mirinde bonaj tradukoj. Ni kore gratulas. Samtempe ni ne povas preterlasi la fakton, ke kelkaj tre lertaj malnovaj esp. eĉ ne respondis al nia peto por ilia kunlaboro. Ni komprenas, ke ili povas havi tro da laboro kaj ke ili perdis la intereson por plia streĉado, sed ni miris ke la fortoj ne sufiĉis por nea respondo almenaŭ. Kun koraj salutoj kaj espero ke la libro estos honoro al nia movado.

La komitato.

Specialan dankon tie ĉi al niaj treege valoraj nesvedaj juĝantoj F. Szilágyi, T. Morariu kaj O. Bünemann, kiuj por servi al nia entrepreno rezignis multan plezuron kaj ripozon.

Komitatano.

— ★ —

Om du vill vinna 5 kronor,

så skall du sända in din kongressavgift före 1 april, ty sedan gäller den ordinarie kongressavgiften, 25 kronor.

Vad får jag uppleva

om jag anmäler mig till kongressen och erlägger kongressavgiften, 25:— kr.

1. Den pampiga öppningshögtidligheten i Stockholms vackra konserthus den 4 aug.
2. Esperantogudstjänster, protestantisk och katolsk samt judisk söndagen den 5 augusti.
3. Storslagen konsert i konserthuset den 5 aug. utav Siljansbygdens körförbund med Hugo Alfvén som dirigent.
4. Sommaruniversitetet med föredrag av ett flertal svenska och utländska professorer och vetenskapsmän.
5. Stockholms stads mottagning med supé i stadshusets gyllene sal den 6 aug.
6. Fest på Skansen med musik av blåsorkester, folkdanser, tal osv. 7 aug.
7. Teaterföreställning under regi utav en bland Sveriges skickligaste regissörer, hr Sandro Malmqvist, den 8 aug.
8. En utmärkt litterär afton den 9 aug.
9. Den stora kongressbalen i stadshusets Blå hall den 10 aug.
10. Kongressens högtidliga avslutning den 11 aug.
11. Deltagande enligt vars och ens önskan i de 20-tal fackkongresser, som skola hållas.
12. Rätt att delta i UEA:s offentliga arbetssammanträden.
13. Erhåller det vackra kongressmärket samt samtliga värdefulla kongressdokument.
14. Erhåller kongresskommitténs hjälp med anskaffande av logi och mat till förmånliga priser. (Logi för hela kongressveckan emellan priserna 11:20—49:— kr.)
15. Filmad i samband med filmupptagning utav de större kongresshändelserna.

Alla dessa nämnda förmåner erhållas gratis. Dessutom beviljas rabatter och mycket nedsatta priser för kongressdeltagarna, bl. a. beträffande järnvägsresor, utflykter osv. Vad sägs t. ex. om en 3.000 km.-färd Stockholm—Lappland för endast 150 kr. under en vecka, vari ingår

ersättning för resor, logi, ledning, drickspengar. Eller 900 km.-färd åt nordvest till Jämtland och Trondheim (Norge) för endast 80 kr., innefattande alla omkostnader. Billigaste efterkongressen, men icke mindre intressanta och roande, går till Gotland (Visby), rosornas och ruïnernas ö. Hela kostnaden endast 35 kr.

Naturligtvis måste både du och jag vara med på denna utomordentliga kongress. Och där få vi ju även prata esperanto med folk från 30 olika nationer. Alla tiders upplevelse!

Jag anmäler mig nu genast! Det gör väl du också!



Studiecirklar

och enskilda personer böra göra hemställen till sina platsers föreläsningsföreningar, att någon av nedanstående statligt godkända föredragshållare kallas att under höstterminen hålla föreläsning.

Föreläsningsföreningarna måste dock stötas på senast 1 april.

1. G. Ahlstrand, Älvkarleö: Världsspråksproblemet och försöken till dess lösning. (Skiptikonbilder.)
2. Fr. Ahnfeldt, Torskors: Hjälpspråket esperanto.
3. Sam Jansson, Skogen 23, Lidingö: Esperanto som studieämne. En lösning av världsspråksfrågan.
4. E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm: Världshjälpspråket Esperanto. (Skiptikonbilder.) — Esperanto som turistspråk. (Skiptikonb.)
5. K. Söderberg, Kungsgatan 10 A, Uppsala: Esperanto som internationellt språk.



S. E. F:s lokalavdelningar

ha tillställts cirkulär rörande årets matrikel (som i god tid före årsmötet kommer att gratis tillställas förbundets samtliga medlemmar), UEA-delegerade, SEF-årsmötet, Universella Esperantokongressen osv.

Kiu volas reklami pri la perkoresponda kurso? Reklamiloj (prospektoj kaj afiŝoj) estas senkoste haveblaj ĉe la ekspedejo de SEF.

D-ro Leono Zamenhof mortis.



Leono Zamenhof.

Varsoviaj esperantistoj ne povas ankoraŭ forgesi la en decembro 1933 okazintan subitan morton de l' frato de D-ro Zamenhof, Felikso, kaj jen mia mano tremas kaj kun kortuŝo mi devas skribi pri la ĵus okazinta malfeliĉa sortbato, la morto forrabis de ni la lastan fraton de nia karmemora Majstro, *D-ron Leono Zamenhof* la 7an de februaro matene en frua aĝo de 58 jaroj.

La malboniĝo de sanstato de d-ro Leono kaŭzis la tro frua morto de lia frato Felikso kiun li tre amis. Jen li diris: nun venas mia vico.

Dimanĉe la 4-an de februaro okazis ia vespermanĝo pro la baldaŭ okazonta edziniĝfestado de lia filino Wanda. D-ro Leono Zamenhof estis en tre bona humoro, kvankam li ŝajnis jam suferi pro koro. Reveninte hejmen li sentis sin tre malbone kaj ricevis unuan atakon, tuj venis f-ino d-ro Zofio Zamenhof, kiu konstatis iom da pliboniĝo.

Tiuj tagoj estis vera turmento por la mortinto. La lito kiun li en la lasta tempo forlasadis nur malofte kaj kiu kvietigis liajn fizikajn turmentojn fariĝis por li fonto de novaj doloroj.

Malgraŭ tiuj grandaj fizikaj kaj psikaj doloroj li neniam esprimis plendon. Videble li supozis ke lin atendas ankoraŭ pli grandaj suferoj.

D-ro Leono Z. post apero de unua broŝuro de sia frato ĉiam fervore kunhelpis al li laborante senĉese por bono de l'

homaro partopreninte en ĉiuj esperantaj organizaĵoj. Krom tio multe da ŝatataj artikoloj de d-ro Zamenhof aperis preskaŭ en ĉiuj esp. ĵurnaloj. Jen mi citas kelkaj el liaj verkoj: *Mia Liro*, *Aspazio*, *Profesilas kaj Laodamia*. Same lasttempe li ĉiam verkadis aŭ dum libera tempo oferadis sin kiel vicprezidanto de *Surdmutula Asocio* aŭ aliaj filantropaj asocioj, kie li estis ĉie amata.

Kiel persona amiko mia mi persone ne povas forgesi la amindan vizaĝon, la kristale puran karakteron de la neforgesebla d-ro Leono Zamenhof. Kiom foje mi parolis aŭ renkontis lin ie ajn li postlasis ĉe mi la plej agrablan senton, kaj antaŭ nelonge mi kun la mortinto faris planon kiamaniere faciligi la karavanon surŝipe al la 26-a Universala Esperanto Kongreso 1934 en Stockholm, kie li ankaŭ intencis partopreni, sed li ne ĝisvivis.

La enteriga ceremonio okazis la 9-an de februaro precize je 13a. Fidela samideanaro partoprenis la funebran ceremonion. Adiaŭis en plej kortuŝaj vortoj la neforgeseblan mortinton la reprezentantoj de filantropaj institutoj. Komenciĝis la ceremonio en la tombejo per religiaj kantadoj plenumitaj de la Varsovia ĉefkantoro Szerman kun lia ĉefsinagoga ĥoro.

Modeste, senbrue li vivis kaj modeste mortis. Kaj venos la horo kiam ĉiuj reprezentantoj de la tuta mondo pilgrimos al la tomboj de sanktaj kaj gravaj cerboj por frate kaj amike labori por estontaj generacioj.

Dormu do Gezamenhofoj, la homaro ekkomprenos Vian gravan rolon en progreso de la homaro kaj oni honorigos Vin laŭ Viaj meritoj. Tiu tago venos!

Mi adiaŭas Vin d-ro Leono Zamenhof. Iru silente al mistera vivo kaj rakontu al Via kara frato Ludoviko ke ni memoras lin kaj ĝis fina venko ne forgesos lian grandan verkon.

Post finkanto de kantoro Szerman la malĝoja kantata himno ĉirkaŭsonis la malsupren glitantan ĉerkon, apude la tombo de Felikso proksime de Majstro Ludoviko super kiu fermiĝis la tero. Sur la tombo amasiĝis florkronoj.

La esperantistaro kun vundita koro disiĝis. Dormu en kvieto! La memoro pri Vi restos en niaj koroj por ĉiam.

Varsovio 11 de februari 1934.

Adolfo Oberrotman.

Från Riksstudieledaren.

Esperanto inom A.B.F.

Vi ha nu kommit så långt in på 1934, att vi börja få en överblick över studieverksamhetens omfattning under föregående år. Inom ABF har esperanto som studieämne för varje år vunnit i popularitet och vunnit ett intresse, som är glädjande stort. Statistiken lämnar bevis, som inga spetsfundiga utläggningar kunna bortförklara, att intresset för världsspråksfrågan och esperanto som internationellt hjälpspråk är på marsch framåt.

Framgången beror helt visst på det faktum, att de internationella problemen tränga sig på den vakna, studieintresserade ungdomen och pocka på uppmärksamhet och att esperanto som studieämne är lätt att komma tillrätta med. Det är inte alls nödvändigt, att man i ledningen för en studiecirkel i esperanto har en fullt kompetent esperantist. Esperanto går att studera, och man når påtagbara resultat, även om cirkelns medlemmar allesammans äro nybörjare.

Vi må också notera det intresse, som på ledande ABF-håll visats för esperanto, och det är att hoppas, att samarbetet mellan esperantoorganisationerna och ABF måtte bli ännu mera intimt till alla parterers båtnad. Vid studiesäsongens början upplät redaktionen för ABF:s tidskrift utrymme åt SEF:s riksstudieledare, som i en längre artikel belyste esperanto som studieämne och gav en del tips för cirkelstudier i esperanto.

Ett hjälpmedel för organiserandet av fortsättningskurser i esperanto fingo cirkelarna genom den av Förlagsföreningen i serien SEF:s handböcker utgivna »Huru leder man fortsättningskurser i esperanto?». Denna handledning har kommit till riktig användning och fyller tydligen ett behov.

I detta sammanhang må framhållas vikten och betydelsen av, att de nystartade studiecirkelarna i esperanto övergå till fortsättningscirkel under kommande säsong. Endast på så sätt blir det betydelsefulla resultat av studiearbetet. Det tillkommer esperantisterna på respektive platser, där nybörjarcirkel arbetar, att hjälpa till härvidlag.

Under 1932—33 hade inom ABF 531 cirklar valt esperanto till studieämne. Det är icke mindre än 10 % av hela antalet arbetande studiecirkel. Som en jämförelse och ett bevis på esperantos frammarsch må nämnas att 1928—29 fanns det 266 cirklar eller 9,13 %. 1929—30 sjönk siffran något till 255 eller 8,36 % 1930—31 ökar antalet till 299, det är 8,71 %. 1931—32 ökar intresset kraftigt. Vi registrera 432 cirklar, vilket gör 10 %, och sista året ökas antalet med ytterligare 99 cirklar. Det kan man kalla bra marscherat. Det är rekord.

Esperanto ligger som god tvåa bland ämnena, endast distanserat av föreningskunskap. Bland språken ligger engelskan närmast på fjärde plats med 364 cirklar, det är 6,85 % av hela antalet cirklar och innebär en ökning av 20 cirklar. Tyskan kommer på fjortonde plats och har 146 cirklar. På trettiofemte plats står franskan med 11 cirklar.

Anmärkningsvärt är, att varken ido, occidental eller något av de övriga världsspråksprojekten har någon cirkel. Det är ju ett faktum, som talar för sig själv.

ABF-rapporten kunna esperantisterna med tacksamt godkännande lägga till handlingarna. Den är ett eklatant bevis på, att esperanto lever och omhuldas av ständigt nya grupper människor med växande intresse.

Einar Dahl.



S. O. S.

havas nun tri anoncitajn membrojn. La franca S.O.S. ampleksas pli ol 1000. Ne prokrastu la aliĝon, se vi konsideras. ke la radiokampo estas vere grava. Kaj prilaborota. Ni spertis, ke multaj samideanoj neniom scias pri tre bonaj, belaj sendoj de facile kapteblaj radiostacioj. Por la ŝilingo (1 kr.) sendota ili ricevos ĉiumonate informon pri la regulaj sendaĵoj kaj multaj neregulaj. Kaj la plej grava: oni povas kunlabore danki favorajn staciojn kaj peti hezitemajn pli kaj plu sendi.

Vidu S.O.S.-alvokon en la februaro numero!

Som bilaga med detta n:r följer en anmälningsblankett till årsmötet i Södertälje under pingsten.

201 ĝis 270.

Pro manko de loko ni nun enpresigas nur 70-o da kongresanoj.

201. Regina Lübeck, oficistino, Maneezi 10, Tallinn, Estonio.
202. Hilja Tulp, instruistino, Roopa 7, Tallinn, Estonio.
203. Meta Terri, infanĝardenistino, Tehnika 13, Tallinn, Estonio.
204. Olga Johanson, vendistino, Kvidu 40, Tallinn, Estonio.
205. Albert Seppel, instruisto, Leisi, Estonio.
206. Alma Roos, oficistino, Rana 32—22, Tallinn, Estonio.
207. Bernhard Eriksson, presisto, Biblioteksgatan 30, Stockholm, Svedujo.
208. Maurits Andersson, librobindisto, Vindhmsgatan 17 a, Upsala, Svedujo.
209. Harry Ingham, instruisto, Avondale Road 21, Chesterfield, Anglujo.
210. C. Ashmore Baker, inĝeniero, Delicott Close 12, Welwyn Garden City, Anglujo.
211. Winifred Roberts, instruisto, Red Down Road 74, Coulsdon, Anglujo.
212. C. A. Gustafson, Valtorp, Svedujo.
213. Charles Olsson, litografisto, Skjutbanegatan 35, Göteborg, Svedujo.
215. L. Åstrand, Vikingavägen 18, Nynäshamn, Svedujo.
216. Irma Jansson, Lillån, Svedujo.
217. Anton Gustafsson, Gottröra, Svedujo.
218. Sigrid Dietrichson, instruistino, Wergelandsvegen 5 IX, Oslo, Norvegio.
219. Gunnar Furhammar, Box 349, Insjön, Svedujo.
220. Almida Zetterlund, Kocksgat. 35 B, Stockholm, Svedujo.
221. Ernst Juneby, Kanalĝatan 3, Jönköping, Svedujo.
222. Margareta Lindahl, Klostersgatan 52, Jönköping, Svedujo.
223. B. J. Bowier, instruistino, V. Boetselaerlaan, 18, 's Gravenhage, Nederlando.
224. P. W. van Sijn, instruistino, Stadhouderslaan 80, 's Gravenhage, Nederlando.
225. E. D'hont, oficistino, V. Swietenstraat 134, 's Gravenhage, Nederlando.
226. M. E. Korndörffer-van Benten, Stadhoudersplein 34, 's Gravenhage, Nederlando.
227. E. C. Bowier, Eusebiusbuitensingel 49, Arnhem, Nederlando.
228. Ella Nilson, fotografistino, Torget 2, Sölvesborg, Svedujo.
229. Hans Poensgen, plantejestro, Bülowstrasse 13, Solingen, Germanujo.
230. L. Agoustine, ĵurnalisto, Rue Durantois 30, Paris 15, Francujo.
231. Lakshmiswar Sinha, Bengal, Hindujo.
232. Kristis Bruklis, instruisto, Alsungas skola, Alsvanga, Latvio.
233. Otto Roesel, fabrikestro, Edenhall, Borås, Svedujo.
234. Margit Thoraëus, akuŝistino, Sjukhemmet, Skillingaryd, Svedujo.
235. Holger Ekblad, Villa Skogbacka, Kvikksund, Svedujo.
236. Frida Persson, instruistino, Box 47, Torskors, Svedujo.
237. K. C. Wagenaar, instruistino, Ambtstraat 133, Almelo, Nederlando.
238. H. M. van der Wielen, Groesbeeksche Weg 81, Nijmegen, Nederlando.
239. E. J. F. Wilmink, Spoorstraat 24, Nijmegen, Nederlando.
240. R. Koerselman, Diepenveenscheweg 199, Deventer, Nederlando.
241. C. M. Molenaar, instruistino, Onderwijzeres, Twisk-N.H., Nederlando.
242. Einar Dahl, instruisto, Ridhusgatan 6, Uddevalla, Svedujo.
243. Bror Lindström, lignajisto, Vattholma, Svedujo.
244. Elisabet Palmblad, kontoristino, St. Eriksgatan 55, Stockholm, Svedujo.
245. Gustav Nilsson, inĝeniero, Västmanagatan 47, Stockholm, Svedujo.
246. Maria Ivanova, Väike Pärnu mnt 11—2 a, Tallinn, Estonio.
247. O. Keturnen, prokuristo, Torikatu 29, Joensuu, Finnlando.
248. W. Pestinger, termezuristo, Breurwiesenstrasse 3, Frankfurt/Main, Germanujo.
249. F. L. Wachmann—Stroh, Kroostweg 21 e, Zeist, Nederlando.
250. Anna Dittmar, Naüheimer 45, Berlin—Wilmersdorf, Germanujo.
251. Leo Burchert, bankoficisto, Yorkstrasse 56, Königsberg, Ostpreussen, Germanujo.
252. Jean Couteaux, direktoro de hospitalo, Rue de Faubourg 27, S:t Jacques, Paris 14, Francujo.
253. Einar Zachrisson, lokomotivisto, Box 114, Munkedal, Svedujo.
254. John Stenström, adjunkto, Ulricehamn, Svedujo.
255. Gustav Nyqvist, Norrbacka II, Skara, Svedujo.
256. Siri Linnander, Völundsgatan 9, Stockholm, Svedujo.

SVEDA KRONIKO

Pro la granda kresko de Sveda Esperanto-Federacio pli kaj pli da lokoj amasiĝas per siaj raportoj sub »Sveda Kroniko». Ni bonvensalutas ilin, sed ni devas tre mallongigi la raportojn por ke ĉiuj havu lokon. Do, koncizajn raportojn!

ALVESTA. 23.1. lektoro H. Seppik faris lumbildparoladon pri sia hejmlando. Bone interpretis F. Johansson el Blädinge. 29.1. s-ino Erika Seppik havis provlecionon Cseh-metodan antaŭ pli ol 100 homoj. Kurso kun s-ino Seppik kiel instruistino komenciĝis. 38 kursanoj.

ARLÖV. 23.1. 34 Esperantista klubo en Arlöv jarkunvenis, kaj elektis la sekvan estraron: Gottfrid Nilsson, prez.; Erik Bergkvist, kasisto; Gösta Bondesson, sekr.; Waldemar Wahlkvist, vic prez.; Svea Wahlgren, vicsekr. Inter alie la klubo decidis aranĝi nuresperantan konversacikunvenon, unufoje semajne, por kapabligi la membraron ĝis la kongreso, kaj la unua okazis 29.1, multvizitata kaj kun bona rezulto. *G.B.*

BOXHOLM. 9.2. nia klubo jarkunvenis Ĝi havas 12 membrojn. Estraro estas:

- 257. Fritiof Ahnfeldt, instruisto, Inglatorp, Torskors, Svedujo.
- 258. Ina-Birgit Ahnfeldt, " "
- 259. Gudrun Ahnfeldt, " "
- 260. Alma Ahnfeldt " "
- 261. Edvin Svensson, hejtisto, Ulleråkers sjukhus, Upsala, Svedujo.
- 262. J. A. Hansson, fervojisto, Järnvägen, Munkedal, Svedujo.
- 263. Marcel Dupuis, inĝeniero, Rue de Cluny 17, Paris 5e, Francujo.
- 264. Annie Hellinx, Van Oldenbarneveltlaan 25, Hilversum, Nederlando.
- 265. C. M. Scheffelaar, Pijnboomstraat 72, 's Gravenhage, Nederlando.
- 266. E. C. Klaassen, Frankenslag 392/C, 's Gravenhage, Nederlando
- 267. J. C. R. Klaassen, Frankenslag 68, 's Gravenhage, Nederlando.
- 268. Gustav Hedert, maŝinisto, Elektricitetsverket, Skara, Svedujo.
- 269. Tora Hedert, " "
- 270. Britt-Mari Ländstedt, Turingevägen 53, Älvsjö 2, Svedujo.

Ernst Holmberg, Margareta Stenström, Britt Johanson, Alvar Wihlmir kaj Anton Johansson. *E. B.*

BORAS. La klubo »Verda Rondo» invitis s-ron Morariu bedaŭrinde iom malfrue, ĉar ni ne sciis, ke li jam de somero estas en nia lando. Tamen ni eĉ nun brile sukcesis. S-ro M. faris provlecionon 14.1. antaŭ plenplena salono. La gazetoj neniam antaŭ skribis tiom favore pri niaj kursoj. Per sia agrabla personeco s-ro M. gajnis ĉiujn. Ni povis starti tri kursojn por komencantoj: la plej granda grupo kun 70 anoj en la studrondo de ABF, la dua por 60 skoltoj en ilia propra ejo, la tria por 20 membroj de »Nationella Ungdomsförbundet». La lastaj rondoj ĝis nun estis tute neatingeblaj por ni, sed dank' al s-ro M. nun ni havas inter la kursanoj tiel la komandanton de la skoltoj, s-ro instruiston Blomgren, kiel la prezidanton de SNU, s-ron Lundgren.

GEVLE. La jarkunveno okazis 22.2. La estraro havas la jenan konsiston: G. Åström, prez.; E. Holmkvist, vicprez.; G. Bengtsson, sekr.; G. Hedbom, vicsekr.; S. Edenby, kasisto; E. Holm, bibliotekistino; G. Edenby, klubmajstrino. — Ĉe la jarfino la klubo konsistis el 40 membroj. Dum la jaro unu kurso kaj tri studrondoj laboris, kaj laboras ankaŭ dum la nuna jaro. La ĝojiga fakto estas, ke la kurso estas aranĝita de ABF. *B-n.*

HÄRNÖSAND. S-ro Tibor Czitrom, ĉi tie faris plurajn prelegojn kaj provlecionojn. Tri komencantaj kursoj okazas en diversaj partoj de nia urbo. Partoprenas



T. Czitrom (meze) en la daŭriga kurso.

ĉirkaŭ 60 personoj. Krome gvidas s-ro Czitrom daŭrigan kurson. Li instruas tie krom la gramatiko kaj parolekzerco, ankaŭ la organizon kaj historion de nia lingvo. *La tradukanto.*

KATRINEHOLM. 17.12 1933 okazis kursfiniĝa festeno en Flen por la komencaj kursoj en Katrineholm, Flen kaj Sparreholm, kiuj estis aranĝitaj de ABF kaj la Esperantoklubo kaj gviditaj de la holanda esperantoinstruisto Sipke Stuit. Dum la festo okazis kantado, deklamo, esperantodialogo ktp. Literatura ekspozicio estis aranĝita. Ĉirkaŭ 75 personoj ĉeestis.
Eriko.

KINNA. Provleciono de red. Morariu. Ankaŭ instruistoj aliĝis al la kurso, kiu estas grava progreso.

KIRUNA. 4.1. nin vizitis Dro Szilágyi kaj per helpo de ABF ni aranĝis prelegon kun lumbildoj. La salono, kiu havas 200 sidlokojn, estis tutplena kaj bedaŭrinde multaj devis reiri pro manko de loko. Dro S. parolis pri sia hejmlando kaj la ĉeestantoj atente sekvis lian rakonton. — 17.1. Montlagopo jarkunvenis. La nova estraro estas: M. Bengtsson, prez.; E. Norberg, vicprez.; E. Lindell, sekr.; E. Olofsson, kas., kaj H. Holmlund. La klubo havas 88 membrojn. — 7.2. okazis ordinara kunveno. 70 klubanoj ĉeestis kaj elektis kiel klubstudgvidanton A. Nilsson. La esperantoprogramo estis riĉenhava. Mallongaj paroladoj de la »novuloj» Söderberg kaj Holmkvist pri laponoj kaj pri la historio de Kiruna. Fine s-ro Flemström instruis skikuradon (legu: kiel oni ne skikuru) pere de bildoj, bone desegnitaj de s-ro Holmlund.

LESSEBO. La plej feliĉa loko en la tuta mondo, ĉar tie ĉi ekzistas neniu senlaborulo. Ankaŭ neniu esperantisto. 22.1. lumbildparolado de lektoro Seppik pri Estonio. Bonege interpretis s-ano P. Jacobson el Växjö. 30.1. Cseh-metoda provleciono de s-ino E. Seppik. Kurso komenciĝis kun 38 partoprenantoj. Laborista Kleriga Asocio arangas.

MALMÖ. Klubo Esperantista de Malmö aranĝis 21.2. »Ĉeĥoslovakian Vesperon», kiu estis multnombre vizitata. Rakontis s-ro Helge Andrén ŝerce kaj bonhumore pri motorcikla veturado, kiun li, kune kun tri aliaj klubmembroj, entreprenis al Ĉeĥoslovakio somere 1933. Post »lingva kvaronhoro», bonege prezentata de s-ro Börje Persson, estis montrataj lumbildoj kun klarigoj en modela Esperanto de s-ino Ester Andrén. Antaŭ la okuloj de la ĉeestantoj aperis bildoj el la mirinde bela »Bohema Paradizo». Kelkaj bildoj pri Prago finis la serion. Es-



Imitinda nova maniero de efika reklamo el Borås.

tis ludataj komponaĵoj de ĉeĥaj komponistoj.
Partopreninto.

MUNKEDAL. 24.2. Kunvenis »Ĉiam Antaŭen». La salonon esperante delikate dekoraciis niaj festenestrinoj. S-ano Dalqvist violone ludis kaj komune ni kantis. Proponoj rilate al la jarkunveno de la distrikto pritraktiĝis, kaj reprezentantoj fariĝis Einar Zachrisson kaj Karin Blomberg. Oni decidis bindi kelkajn jarkolektojn de nia ŝatata »La Espero». Sep anoj novaliĝis al SEF.
Z-filo.

SANDVIKEN. Esperanto Societo de Sandviken jarkunvenis 4.2. Estraro por 1934 estas: Sven Källgren, prez.; Tore Nilsson, kas.; Valter Strömbom, sekr.; John Ling kaj Erik Strand, delegito de UEA John Ling, bibliotekisto Erik Wiksell. Peranto por Segis Sven Källgren. La societo decidis sendi proteston al Radiotjänst pro la decido ne doni al la granda sveda esperantistaro sufiĉe da tempo en radio.
S. K.

SKARA. 20.1. finiĝis la kurso, kiun H. Seppik gvidis dum dec. kaj jan. Samtempe kun la kursa finfesto okazis jarkunveno de la loka grupo, kie inter alie ĉefredaktoro de la loka gazeto kaj gesanoj Seppik estis elektataj honoraj membroj.

STRÖMSBRO. 17.1. Parolis Ing. Harry Larsson pri »Hodiaŭa Germanujo». La parolado estis ilustrita per lumbildoj kaj

publika. Ĉirkaŭ 100 personoj ĉeestis. La profito de la okazaĵo estis bonvenita pliaĵo al la klubkaso. — 7.2. jarkunvenis Strömsbro Esperantoförening. La novelektita estraro havas jenan aspekton: H. Larsson, prez.; Karl Andersson, v. prez.; Eric Jönsson, kor. sekr.; Gustav Larsson, v. sekr.; Axel Westerlund, kas. Oni decidis sendi al »A.-B. Radiotjänst» proteston, ĉar ĝi tute preterlasis la grandan petajon de la esperantistaro.

La Verduloj.

teresa. En la lasta numero partoprenis 12 personoj, plejparte novuloj. *BeRo.*

SÖDRA NY. 7.2. fondiĝis en tiu loko esperanta klubo, kiu ricevis la nomon »La Fajrero». Kiel estraron por 1934 oni elektis David Nyborg, prez.; Börje Nilsson, sekr.; Erik Andersson, kasisto. La ĉeestantoj unuanime decidis aligon al S.E.F. *D. N.*

ULRICEHAMN. Red. Morariu faris paroladon pri Rumanujo. Lerte interpre-



Esperanta festeno en Mellansundet 24.1.34. Partoprenis gesamidanoj el Arboga, Kvicksund kaj Eskilstuna. (Vidu raporton en februara n-ro.)

SUNDSVALL. Dum la nuna laborsezono »Amika Rondo» vigle laboris por perfektigi siajn membrojn kaj aranĝi novajn kursojn. En Skönsberg kaj Skönvik, du apudaj industrilokoj, estas gvidataj komencaj kursoj de s-ro C. W. Sjögren. La kurson de Skönsberg partoprenas multaj senlaboruloj dank' al mona subteno de diversaj lokaj sindikatoj. En Vivstavarv s-ro O. K. Johansson gvidas daŭrigan kurson por tiuj kiuj partoprenis la lastvintran kurson de s-ro Tibor Czitrom. Kaj fine por la membroj de la klubo s-ro A. Hellbom kaj E. Björkstrand gvidas du kursojn, unu el ili estas daŭriga, la alia estas kurso supera por progresintoj. — La kluba estraro havas jenan aspekton: prez. C. W. Sjögren; vicprez. T. Farm; sekr. Anna Dahlgren; vicsekr. Sigrid Berggren; kas. Y. Petersson. Estas menciinde diri ke »Viva gazeto» sub redaktado de s-ro O. K. Johansson montriĝis vere bona kaj tre in-

tis adjunkto Stenström, supera instruisto en la meza lernejo. Favora raporto en la loka gazeto. M. gvidas nun daŭrigan kurson por 20 kursanoj de Jean Forge.

VARBERG. Red. Morariu, kiu uzas siajn dimanĉojn por prelegado, lumbildparoladis ĉi tie, kaj dum vespera kunesto tiom efike demonstraciis la Cseh-metodon, ke la grupo unuanime decidis reinviti la gajan instruist-aktoron. Ankaŭ Göteborg, Gislaved kaj Viskadalens Folkhögskola invitis s-ron M. por lumbildparoladoj, kaj konstante alvenas novaj interesiĝoj. Freŝa vento ŝveligas la velojn de la verda ŝipo en Vestergötland.

VÄXJÖ. 24.1 prelego pri Estonio de lektoro H. Seppik. 29.1. Cseh-metoda provleciono antaŭ ĉ. 150 pers. 30.1. gesoj Seppik faris lumbildparoladon pri Estonio. Kurso komenciĝis la 31.1. 6.1. komenciĝis dua grupo kaj nun la kursanaro kreskis jam ĝis 70 personoj.



Festeno de la komencanta kurso en Örebro la 17an de dec. 1933.

ÖREBRO ESPERANTO SOCIETO jarkunvenis 6.2. Okazas nun du daŭrigaj kursoj, gvidataj de fr-ino Ruth Hallgren kaj s-ro G. Lager. Fr-ino Ruth Hallgren estis elektita kiel honora membro de

la klubo. Nova estraro estas: Sigurd E-kendahl, prez.; A. Herlin, vicprez.; Irma Jansson, sekr.; f-ino K. Olsson, vicsekr.; Gustav Andersson, kasito. *G. B.*

Esperanto per Finlanda radio.

Esperantoinstituto de Finnlando komunikas: Tre estimataj samideanoj!

Nia landa ĉefradio »Suomen Yleisradio» akceptis la instruadon de Esperanto. La lecionoj okazas ĝis la venonta majo, ĉiumerkrede je la 19,15. La tempo estas tiu de la Orienta Eŭropo. Por ĉiu leciono oni disponas 25 minutojn. Estas tre dezirinde ke la samideanoj de via lando aŭskultu kaj danke informu al la radiostacio pri sia aŭskultado. La adreso: Suomen Yleisradio, *Helsinki*, Finnlando. Tiamaniere vi helpas al ni havigi al Esperanto konstantan pozicion en la radio nialanda.

La ĉefa stacio nia estas: Lahti, ondlongo 1796,4 m. La sekvanta: Helsinki, ondlongo 335,2 m. Ĉar en kelkaj esp. gazetoj estas la erara informo, ke ĉe ni estas la tempo tiu de mez-Eŭropo, ni ankoraŭ atentigas ke ni havas la tempon de la Orienta Eŭropo. La kurslibroj estas: Esperanto-kurso kaj Lyhyt Esperanton kiel lioppi, ambaŭ verkitaj de Setälä. Kiel vortaro estas uzata la finna ŝlosilo.

Sveda vespero en Varsovio.

La 22-an de marto 1934 Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo aranĝos »svedan vesperon» sub protektorato de la sveda ministro en Polujo lia ekscelenco Einar Hennings. Samtempe estos malfermita internacia esperanta turisma ekspozicio kun speciala atentigo je Svedujo. Ni tre petas samideanojn, ke ili bonvolu alsendi al ni interesan materialon ekspozician kiel eble plej baldaŭ je adreso: Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo, str. Kredytowa 5, Varsovio, Polujo.

Insänd nu genast

din avgift för kongressen! Du har allt att vinna men intet att förlora, om du så gör. Kongressen kommer att ge dig så rika minnen, så intressanta upplevelser, att kongressavgiften mångdubbelt uppvägs. Man kan gott säga, att »erfarenheten kostar dig rakt ingenting».

Lakshmiswar Sinha en Dalekarlio.

*Sukcesaj prelegoj en multaj
lokoj kaj iom da aventuroj.*

Nia hinda samideano, d-ro Lakshmiswar Sinha dum du semajnoj estis en la koro de Svedlando, invitita de Dalekarlia Distrikto de SEF. Ke tio estas ebla, ni ŝuldas dankon al nia distrikta prezidanto, s-ro Gustav Johansson, kiu dum la antaŭa vizito de s-ro Sinha en Svedlando interpretis liajn prelegojn multloke en norda Svedlando kaj nun sukcesis logi la

ebla lingvo. Ankaŭ ĉi tie estis bela sukceso, kaj multaj ricevis tute alian opinion pri Esperanto, aŭdinte ĝin parolatan. Ĉiuj ĵurnaloj de la urbo favore raportis kaj krom la prelegisto, kiu ricevis multan laŭdon pro la lerteco per kiu li uzis la lingvon, ili ankaŭ komplimentis la interpretiston pro la tre lerta kaj rapida traduko.

Svärdsjö estis la tria etapo. Tie prelegis s-ro Sinha la 24-an antaŭ 100 personoj. Aranĝis Dalekarlia Distrikto de SEF, kiel ankaŭ en Linghed, kie okazis prelego la 25-an antaŭ 75 personoj. Ne multe da aŭskultantoj estis nia unua penso, sed ni trankviliĝis aŭdante, ke la prelegoj



Falun: meze s-ro Sinha kaj antaŭ li, sidanta, lia interpretisto, Gust. Johansson.

malproksimlandan gaston al nia provinco.

La unua prelego de d-ro Sinha okazis en Domnarvet. La temo estis »Hinduĵo, pasinta kaj nuna«. Ĉar oni tie faris bonan reklaman laboron, i.a. artikoleto kun portreto en Borlänge Tidning, s-ro Sinha havis la plezuron jam de la komenco paroli antaŭ plenplena salono, 470 personoj ĉeestis kaj la sukceso estis nepre-disputebla.

La sekvantan tagon, la 23-an okazis prelego en Falun pri la sama temo. Aranĝis Prelega Asocio de Falun. Jam antaŭ la prelego la ĵurnaloj Dala-Tidningen kaj Falu-Kuriren havis intervjuon kun s-ro Sinha, la laste nomita kun portreto, kaj kiam la hindo kun sia interpretisto, s-ro Gustav Johansson surpaŝis la tribunon, la salono estis tute plena de scivolema publiko, nombranta pli ol 500 personojn, inter kiuj multaj troviĝis, kiuj neniam antaŭe kredis, ke Esperanto estas parol-

tie kutime havas publikon de ĉirkaŭ 25 pers. Dum la aŭtobusa vojaĝo al Linghed okazis amuza epizodo. Survoje al la haltejo nigra kato transkuris la vojon antaŭ s-ro Sinha. Terure! li pensis, kio nun okazos? Kaj kio okazis? Elironte la aŭtobuson li ektravis ke la sola valizo, kiu restas sur la breto ne estas lia. En ĝi troviĝas nur kelkaj dokumentoj kaj leteroj sed ne la hinda vesto kaj la lumbildoj. Kion fari nun, kiam la prelego komenciĝos post kelkaj minutoj? Feliĉe ili trovis sur letero nomon kaj adreson de la posedanto, kiu ankaŭ malfeliĉiĝis, ekrovante nacian kostumon kaj kelkajn lumbildojn anstataŭ siaj gravaj dokumentoj. Per aŭto li devis rapidi al la preleĝejo kien li venis lastmomente por savi la situacion.

Vendrede la 26-an estis la vico de Leksand. En tiu fama turista loko aranĝis Prelega Asocio de Leksand. Ĉeestis 200 personoj. Post la prelego s-ro Sinha kun

sia interpretisto estis invitataj en la hejmon de rektoro Alm, estro de la mondfama lernejo »Siljansskolan». Tie ili pasigis tre agrablan vesperon ĉe la vaste konataj gesinjoroj Alm, pri kies nova eduka sistemo s-ro Sinha jam aŭdis en la hejmlando.

En Grycksbo, la konata paperfareja loko, oni ŝajne estis okupataj de aliaj aferoj, ĉar al la prelego tie la 30-an nur venis 40 pers.

La lasta loko, kie nia hinda samideano parolis estis en Insjön. Aranĝis la tiea esperantoklubo kaj la publiko estis sufiĉe multnombra, 230 personoj.

— — —
La 27-an Klubo Esperantista de Falun havis sian jarkunvenon en pensiono Lindgården. Nova estraro elektiĝis kaj havas jenan aspekton: Gustav Johansson, prez.; Folke Andersson, vicprez.; Wiktor Bonde, sekr.; Hilding Johansson, vicsekr.; Hilding Rynolf, kasisto.

Se oni pripensas kiel indiferece kaj eĉ malamike la publiko en Falun ĉiam tenis sin pri Esperanto oni ne sufiĉe alte povas taksi la viziton de Sinha kaj la servon, kiun li per tiu vizito faris al ni. Mi parolis kun multaj kaj ili senescepte konfesis, ke ili tute ne povis kredi ke la lingvo estas tiel facile uzebla kaj belsona. Multaj eĉ havis la strangan percepton, ke Esperanto estas nova speco de la t. n. »figlingvo», parolata nur de kelkaj svedaj bubaĉoj! Eĉ en klerulaj rondoj oni nun ricevis sian opinion pri Esperanto multe aliigita, kaj iu gimnazia lektoro deklaris, ke oni devas admiri la lertecon per kiu la interpretisto prenis la vortojn el la buŝo de la fremdulo kaj rapide igis ilin komprenataj.

— — —
La 1-an de febr. s-ro Sinha invitis la membrojn de la Falua klubo al adiaŭa festo en pensiono Lindgården. S-ro Sinha parolis pri sia rondvojaĝo en nia provinco kaj siaj impresoj de la restado en Dalekarlio, kaj ankaŭ iom tuŝis aliajn aferojn. La vespero rapide pasis. En la nomoj de la distrikto kaj klubo la duobla prezidanto, G. Johansson, dankis al s-ro Sinha pro lia laboro en la provinco kaj la netakseblaj servoj, kiujn li per sia vizito faris al ni. Ni esperas ke li estas kontenta pri sia vizito en la »mas-regno».

Hilding Johansson.



De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

En la pasinta monato ni legis multe da artikoloj, alvokoj al la kongreso. Tiel multajn, ke ni ne povas registri ilin. Sed espereble la rezulto estos rilata . . .

En *HEROLDO DE ESPERANTO* ni legas (11. febr.), ke la Ljubljana-a Esp. Turisma Komisiono rikoltis tiom grandajn sukcesojn dum la pasintaj jaroj, ke la oficialaj rondoj nun intencas plivastigi la fremdultrafikan propagandon de la bela jugoslava urbo pere de Esp. — S-ro René Messny, prezidanto de la Franca Esp. Radioklubo estiĝis membro de la franca Mara Akademio. S-ro Mesny estas laureato de la Scienca Akademio pro sia verko pri la radiaj ondoj. (Sinceran gratulon!) — La 25-an de februaro en la sama gazeto Julio Baghy eksonigas la novan devizon: »Kvaliton al la kvanto!» kaj urĝigas la internan propagandon de nia kulturmovado. — Alvoko el la sama numero: »Samideanoj komercistoj, bankfakuloj, reprezentantoj de eks- kaj importfirmoj ktp. skribu amase por la *senpage* sendota »Sonderdruck der Exporttafel des grossen Nürnberger Adressbuches 1934» al direktoro Oehlcke, Adressbuch-Verlag, Nürnberg A, Burgstr. 7, postulante la seslingvan kajeron (inter aliaj kun esp. teksto) en unu aŭ du ekzempleroj. — La Esp. Asocio de Estonio *avertas nin kontraŭ du mondvojaĝantoj Valter Loorits kaj John Lepp* (kun aliaj nomoj *Leete, Flamo, Marinetti, Ruven*) kies vagado ŝajnas havi kiel celon nur la ekspluatadon de la gesamideanoj. Kiel ni aŭdis la unua nomas sin estona verkisto, kio li neniam estis, la alia laŭ la cirkonstancoj estona redaktoro, jen Tartu-a univ. profesoro, jen estono, jen italo. — Alia averto: *Jozefo Goldfarb ne rajtas peti monon* por la kovro de la deficito de la Propagandsemajno en Varsovio. Li havas kvitancojn kaj rajtigilon, sed malgraŭ tio oni donu nenion al li. Sciigoj pri la sinanonco de la nomita s-ro estas petitaj al f-ino Halina Weinstein, Warszawa, Leszno 99/5. La nomita s-ro parolas germane, hungare, iom pole kaj esperante. Mezalta, maldika, kun supren kombitaj haroj. Aĝo: ĉ. 32 jaroj.

ESPERANTO (Genève, februaro): El la gvidartikolo de Edmond Privat pri

»La Viena Konferenco»: Ĉiu nacia societo bonvolu tuj esplori la rimedojn por vojaĝo de taŭga spertulo al Vieno.

El *LITERATURA MONDO* ni citas mallongan ĉinan poemeton, tradukitan de Saint Jules Zee. Jen: Cervejo (Uan Vi) — Sur mont' silenta homoj ne troviĝas, — Aŭdiĝas nur parolo en krepusk'; — Arbaron trapenetas sunrebrilo — kaj tie kuŝas ĝi sur verda musk'!

El la *SCIENCA GAZETO* (Jan. — Febr.): Prof. Ivar Broman, sveda sciencisto kredas, ke la infanoj naskitaj printempe havas pli grandan ŝancon resti sanaj. — Bedaŭrinde alia notlibraĵo senigas nin de kelke da iluzioj: »Belaj sunsubiĝoj ne ekzistas; ni nur imagas ilin, se ni kredas al Prof. Haldane. Eĉ la ĉielo ne estas blua, li diras, sed blanka. La bluan koloron ni imagas por kontraŭagi la fortan lumon de la suno. (Por kontraŭagi tiujn konstatojn mi preferas ne kredi la ekziston eĉ de la profesoro.)

El la *SENNACIECA REVUO* (10.2.): Haeckel, la granda germana natursciencisto naskiĝis antaŭ cent jaroj. Li estas la aŭtoro de la t. n. monisma teorio, kies ĉefa principo estas: la unueco de la tuta universo.

El la *INTERLIGILO DE L'PTT.*: Dro Ludwig Mayer, redaktoro de du poŝtaj fakorganoj, ano de la faka sindikato, fidela esperantisto mortis.

El la januara numero de *ESPERO KATOLIKA* ni parte citas la artikoleon; La arto rifuzi manuskripton: Redaktoro de grava beletristika Peking-a gazeto kun la jena ĝentileco resendis artikolon, kiun li ne volis aperigi: — Via respektigata manuskripto trapasis sub miaj okuloj kaj ĝin mi legis kun ravo. Sed se mi riskus ĝin publikigi, la legantoj tuj al mi ordonus elekti tiun juvelon, kiel modelon kaj neniam kuraĝi publikigi ion malpli bonan ol ĝi. — Nu mia longtempa praktiko pravas, ke tiaj perloj povas esti produktataj nur unufoje en ĉiuj dekmil jaroj....

La *FRANCA ESPERANTISTO* rakontas pri Pierre Delaire, 14-jara junulo, liceano en Orleans; en la lasta jaro li komencis lerni Esperanton, en la lasta novembro li ricevis ateston pri kapableco, fariĝis loka delegito kaj instruisto de la Esp-istaj studentoj. (Espereble ni havos novan Emond Privat!)

THE BRITISH ESPERANTIST (Mar-to): Artikoleto pri la poŝhorloĝo de A.D.A.: Al mia fileto mi donacis poŝhorloĝon. Ho kiom li ĝojis dum la unua tago.... En la dua tago li komencis serĉi la neperfektaĵojn de la horloĝo. — En la tria tago li jam komencis malmunti por perfektigi ĝin kaj forigi la nebonaĵojn. Kiam li kunmetis ĝin ree, la horloĝo haltis. Tiam mia fileto ne plu povis uzi ĝin kaj la mirinda ilo, kreita por servo, restas nur senutila amuzaĵo Ni gardu ankaŭ Esperanton kontraŭ la manoj de infanoj — eĉ de infanoj kun lipharoj. (Mi estas certa, ke sekvos iam en alia gazeto responda fabelo de la "infanoj" kaj tiam ankaŭ tion ni publikigos kaj konstatos, ke la justeco estas inter la ekstretoj.)

NEDERLANDA ESPERANTISTO: En 1933 sin anoncis al la diversaj Esp.-ekzamenoj 739 kandidatoj: el ili sukcesis 511.

ESPERANTOBLADET (Febr.) raportas pri la baldaŭa rondvojaĝo de Lakshmiswar Sinha, en Norvegujo, kaj komunikas la riĉan antaŭkongresan programon.

Inter la diversaj gazetoj ni devas mencii la *germanan organon*, kiu (Febr.) plejparte aperigas germanlingvajn kaj parte polemikajn artikolojn por la naci-socialisma reĝimo, sed samtempe ni sciigiĝas, ke la Esperanto movado vivas: en la diversaj urboj oni havas sufiĉe viglajn kursojn kaj kunvenojn kaj en Plauen dr. Penndorf transdonis al la grupo sian 829 paĝan verkon pri la historio de la Plauen-a grupo.

Sur la unua paĝo de la *AŬSTRIA ESPERANTISTO* ni vidas artikolon, direktitan »al la Savintoj de Aŭstrio!» Aliloke: La urbkonsilantaro de Innsbruck decidis la 25-an de oktobro nomi straton »Dr. Zamenhofstrasse.»

La *LABORISTA ESPERANTISTO* (Febr. Amsterdam) raportas pri la federacia jaro: 4250 kursanojn ni enskribis.

Ankaŭ la *ESPERANTISTO* (Tokio, Jan. — Febr.) ne pravas indiferentecon en politikaj problemoj. S-ro Josuke Macuoka skribas: mi fervore dezirus la nuligon de la politikaj partioj La okcidenta stilo de partia politiko ne taŭgas por la kondiĉoj kaj trajtoj de nia nacio

Povas esti, ke ankaŭ en la *VERDA MONDO* estas similaj artikoloj, sed ei

tiuj mi ne povas citi, ĉar ankaŭ en la februara numero mi vidas preskaŭ nur — cetere tre pitoreskajn — japanajn literojn. Tamen mi povas citi subtilan strofon de Hattori-Tooru: »Tra pluvo neĝa — iradas ar' pilgrima — sur vojo preĝa, — Tintad' en nokt' senlima, — fariĝas malproksima».

LA MONDO (Shanghai) ankaŭ ekstreme politikas en la ruĝa direkto. El poemo: »La delegitoj de l' ligo de l' Nacioj — venis alivestite en la mask' aminda — por vizaĝon vian ekvidi, — por sangon vian resuĉi.»

Fine mi volas nur mencii du neesperantistajn gazetojn el eksterlando, kiuj aperigas priesperantajn artikolojn, eĉ esperante kelkajn: la unua estas Valenciennes, revue philatélique échanguste, (Valenciennes), la dua estas la estona *TURISMI TEATAJA*, kiu inter aliaj petas la alsendon de esperantaj gazetoj. El la sama gazeto: La fervojistoj de Pernu fondis societeton. Adreso: Pärnu, Raudtee jaam. La adreso de la Turismi Teataja estas Tallinn, Rjütli 2.

Fersil.



Esperantolitteratur i biblioteken.

Esperantisterna landet runt böra uppmärksamma möjligheterna att med hjälp av offentliga anslag inköpa litteratur till biblioteken. Begär även hos stads- och liknande bibliotek, att de köpa några esperantoböcker. Giv förslag om vilka ni önskar! Sprid sedan kännedom om att de finnas tillgängliga så att de bliva utlånade.

I biblioteken böra framför allt större och dyrbarare böcker ingå, sådana som ej vem som helst har möjlighet att själv skaffa sig.

Vivilds Ungdomsskola i Danmark

är den första skolan i detta land, som officiellt har esperanto på sitt program. Skolan ligger vackert nära Kattegat på Djursland i Jylland, och nu inbjuder skolan unga svenska flickor till kurs där under sommarmånaderna, under vilken förutom esperanto en hel del nyttiga saker läras. Vi hänvisa till annons.

Amika kunesto.

Kongreso esperanta devas esti alispeca ol internacia multlingva kongreso, kie homoj renkontas multajn aliajn, kiuj ne havas la eblon kompreni, ĉar mankas al ili necesa rimedo, komuna lingvo. Ni havas tian rimedon, mirindan kaj efikan, se ni utiligas ĝin racie. Kiel fari?

Granda nombro da fremduloj jam anoncis sin al la Kongreso. Multaj svedoj aŭ jam anoncis sin aŭ baldaŭ aliĝos. Ambaŭflanke la deziro amike kunesti estas tre granda. Tiuj jam solvis la problemon, kiel tuj trovi amikojn, kiuj dum kelka tempo interkorespondis. Sed kial ne racie eluzi la eblecojn, kiujn korespondado donas?

Anoncu samtempe kun la sendo de via aliĝilo ke vi deziras korespondo kun fremdlanda kongresano, informu pri viaj interesoj, via aĝo, via profesio ktp., kaj kien vi post la kongreso veturos. Ĉar precipe post la kongresado — eble iom antaŭ la kongreso — estas grave, ke la fremduloj trovi en la lokoj, kiujn ili vizitos kiel turistoj, afablajn helpemajn konatajn samideanojn por akcepti kaj gvidi ilin. Nur tiel ili spertos la veran atmosferon de Esperantujo.

Ankaŭ tiuj svedoj, kiuj pro manko de tempo aŭ mono ne povos viziti Stokholmon, tiamaniere povos parte sperti tiun travivaĵon, kiun ni nomas universala kongreso, kaj samtempe fari gravan servon al la esperantomovado. Tiel vidos la homoj, ke Esperanto estas bona lingvo: la plej bona ilo por fratigo. Ni tiel preparas la grundon por plua semado kaj belaj rikoltoj; tion ja celas ĉiu universala kongreso.

LKK havas specialan sekcion, kiu prizorgos la ĝustan distribuadon de la anoncoj pri korespondemo. La fremdlandaj kongresanoj bonvolu diri, kiel ili intencas vojaĝi al kaj de la kongreso, kie ili deziras restadi kaj kion ili ŝatus studi. Ne prokrastu la komencon. Flugas la tempo. Baldaŭ vi renkontos aŭ koraĵajn konatajn amikojn aŭ nur eblajn, kiuj certe jam tiel fiksis sian programon, ke vi povos nur malfacile enŝoviĝi en la amikan rondon jam formitan.



Ĉiama propagandilo estas nia Sveda Esperanto-Gazeto. Abonu je ĝi, abonigu viajn konatojn, vendu ĝin en viaj rondoj!

Ingen Esperantoklubb

har längre råd att stå utanför Svenska Esperanto-Förbundet. Ty samtliga medlemmar bli samtidigt anslutna till Universala Esperanto-Asocio, den internationella organisationen. Beträffande övriga fördelar tillskriv S.E.F.:

Insänd 10 kronor

före 1 april som avbetalning på kongressavgiften. Om du ej skulle kunna komma med på kongressen, så får du för din tia i varje fall kongressens märke och alla kongresshandlingarna.

På varje ort,

där det finns 5 esperantister eller flera, böra dessa sammansluta sig och bilda en klubb. Anvisningar finnas i S.E.F:s handbok »La Esperanto-klubo». Sekretariatet ger dessutom gärna anvisningar.

En spännande pojkbok

är

Jaĉjo Holm

kaj liaj kamaradoj

Översatt fr. holländska. På originalspråket gick den på kort tid ut i 80.000 ex. 288 sid. Illustrerad. Inbunden kr. 6:—.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Stockholm 1.


Pri "Barbro kaj Eriko"

la »leter romaneto» eldonita de Eld. Soc. Esperanto skribas Germana Esperantisto:

»Tre rekomendinda legaĵo por komencantoj. Rava korespondado inter du gejunuloj en Svedujo kaj Aŭstrujo, kiuj babilas pri siaj landoj, ties pejzaĝoj ktp. Modela stilo.»

Prezo: sved. kr. 0:60.

Eldona Societo Esperanto
Stockholm 1.

¹ H	E	² L	I	K	O	*	³ A	⁴ N	T	E	N	⁵ O
E	*	A	*	O	*	*	*	U	*	P	*	D
⁶ L	I	R	I	K	⁷ O	*	⁸ I	D	I	O	T	O
P	*	I	*	⁹ O	V	A	L	A	*	P	*	R
¹⁰ A	L	K	¹¹ O	*	O	*	O	*	¹² K	E	R	O
S	*	¹³ O	R	O				¹⁴ P	R	O	*	J
*	*	*	E	*				*	E	*	*	*
¹⁵ A	*	¹⁶ U	L	O	¹⁷ A	M	¹⁸ O	*	¹⁹ L			
²⁰ V	A	Z	O	*	²¹ O	*	²² A	*	²³ O	R	F	O
I	*	U	*	²⁴ I	K	O	N	²⁵ O	*	G	*	G
²⁶ A	K	R	I	D	O	*	²⁷ O	R	N	A	M	I
D	*	P	*	O	*	*	*	T	*	N	*	K
²⁸ O	P	I	E	J	O	*	²⁹ F	A	V	O	R	A

Solvaĵo de la Krucenigmo n:ro 3
(febr.-n:ro).

Första delen av den nya, stora svensk—esperantiska ordboken

är nu färdig.

Dådet är många om mycket ivrigt vänta på den nya ordboken, kommer den att säljas i två delar för att första delen, omfattande bokstäverna a—m, skall kunna komma till användning omedelbart.

Priset på första delen är (häftad) 3 kr. (Ordboken kommer att säljas inbunden i ett band först när hela boken föreligger färdig.)

Obs.! Ingen merkostnad uppstår genom att boken köpes i två delar. Priset för ordboken häftad i en volym kommer att bli lika med sammanlagda priset för de två delarna.)

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578

Mi serĉas korespondantinon

kiu loĝas en bela distrikto de Svedujo kaj kiu eble akceptus min kiel paggasto post la Kongreso. Mi estas vegetarano kaj pacifisto.

Fino F. M. BARTHOLOMEN,
154 Wilbury Rd, LETCHWORTH
Anglujo.

Sensacio en Esperantujo

estas la monata "Heroldo", kiu de post februaro 1934 aperas ĉiumonate kun 8 ĝis 10 paĝoj en tagĵurnala formato kaj ilustrita. La ĉiusemajna "Heroldo" kompreneble plu aperas regule, nun jam en sia 15-a eldonjaro (aperis jam pli ol 750 numeroj). La monata "Heroldo" kostas nur 2.50 svisajn frankojn aŭ egalvaloron por la tuta jaro 1934. Sekve ĝi estas

la plej malkara Esperanto-gazeto

Tuj abonu! Kiu varbas 4 abonantojn, ricevas sian propran abonon senpage. Specimena numero 10-paĝa (grandformataj paĝoj de tagĵurnalo) kontraŭ respond-kupono de poŝto aŭ de UEA, aŭ kontraŭ germana poŝtmarko de 0.20 gmk. Sed postulu speciale la monatan eldonon, aŭ eldonon M (= monata)! Skribu tuj al

Heroldo de Esperanto, Köln
Brüsseler Strasse 94, Germanujo

Abonnemang kan ske hos representanten
för Sverige,

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578
Pris pr helår svenska kr. 3:25. Provnum-
mer 35 öre (inkl. porto).

Vivild Ungdomsskole Danmark

indbyder unge svenske Piger till 4 Mnds
Sommerskoleophold: Maj—15 sept. Sko-
len ligger nær Kattegat paa Djursland i
Jylland.

Alm. Skolefag samt Esperanto, Skole-
køkken, Kjølesyning, Læderplastik og
Gymnastik.

RASMUS NIELSEN
Forslander, Vivild.



Den tunna, skarpa
hålibara men billiga
rakklingen heter

D-ro Zamenhof.

Pris pr st. 0:20, 10 st. 1:75.

»Får härmed uttrycka min belåtenhet
med rakklingorna. De äro de bästa som
jag använt, det kan jag utan överdrift
säga.

Ernst Ek, Stathmosvägen 2, Nynäshamn.»

Eldona Societo Esperanto s.p.r.
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578

Unika lernolibro!

Universala Esperanto Metodo.

De Doktoro Benson.

Enhavanta rektan lernolibron, ampiek-
san ilustritan legolibron, universalan
multlingvan bildvortaron.

41 lingvoj, 11,000 bildoj. 100 listoj de sam-
specaj vortoj. 2 plenpaĝaj tabeloj de la
pronocado de la Esperantoalfabeto en
36 lingvoj. 5 plenpaĝaj tabeloj de la
korelativoj en 36 lingvoj.

559 paĝoj. Fortike bindita. Prezo 20 kr.
ELD. SOC. ESPERANTO, Stockholm 1.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTOS OMBUD



- Alunda:* Gösta Eriksson, Klev.
Arboga: Carl Erik Bergström, Egebo.
Arbrå: Walfrid Johansson.
Arlöv: Elsa Davidsson, Lommavägen 18.
Billesholms Gruva: Nils Welander.
Boden: Hjalmar Pettersson, Parkg. 22.
Borås: Sven Friberg, Ramnalid.
Eksjö: L. Pehrsson, Sydbanken.
Enköping: Emanuelssons Pappershandel, Kungsgatan 16.
Eskilstuna: H. Sandbergs Bokhandel.
— Karl Niekerke, Högalidsgatan 7, Grangärdet.
Fagersta: Birger Eklund, Järnvägen.
Falkenberg: John Larsson, Box 40.
Falköping: G. A. Tholin, Linnégat. 1.
Falun: Einar Anselius, Åsgatan 86.
Fyrunga: Erik Brenander.
Gislaved: P. B. Carlson, Storgatan 7.
Grums: Georg Nordling.
Gyttorp: Thure Johnzon.
Gävle: G. Bengtsson, Tullkammaren.
Göteborg: N. J. Gumperts Bokhandel.
— Erik Ekström, Vegagatan 10.
Hallsberg: Erh. Wärn, Box 925.
Halmstad: J. M. Ahlström, Köpmansg. 2.
Heby: Leander Ström, Strömsvik.
Hudiksvall: H. Svensson, Håstavillan 10.
Hälleforsnäs: Elof Larsson.
Hällekis: Elis Andréason.
Hällevik: H. Ysner.
Hälsingborg: Hedéns Bokhandel.
— Killbergs Bokhandel.
— Lisa Larssons Bokhandel, Södergatan 17
— G. Henriksson, Brommagat. 32.
Härnösand: A. A. Sjölund, S. Brännan.
Hässleholm: Fru Elin Fors, Österg. 28.
Höganäs: Per E. Nilsson, Långgatan 6.
Höör: Billingska Bokhandeln.
Jönköping: Knut Jensie, Kanalgr. 57.
Karlskoga: Sune W. Ahlm, Kanong. 673.
Karlskrona: K. L. Nilsson, Ehrensvärdsgatan 5.
Karlstad: H. Jonsson, Box 76, Råtorp.
Katrineholm: Elof Ohlsson, Fredsg. 43.
Kavlås: Erland Björkman, Kungslena.
Kil: H. Nordling, Järnvägsstationen.
Kilafors: Martin Berglund, Frivy.
Kiruna: Aron Nilsson, Kv. 123—7.
Klippan: Karl Nilsson, 511.
Kumla: Fritz Ström, Box 139.
Kvicksund: Holg. Ekbladh, Skogsbacka.
Kvitsleby: Torild Grönlund.
Kävlinge: Malte Smith, Bruksgatan 13.
Landskrona: E. Olsson, Hantverkareg. 19.
Lidköping: Otto Lindvall, Vinbergsg. 10.
Ljusne: Holger Svensson, Box 423.
Linköping: Harry Nilsson, Trängg. 6.
— Hillevi Zachrisson, Gelbgjutaregatan 5, Tannefors.
Luleå: E. Blomkvist, Box 807, Skurholmen.
Lund: Olle Olsson, Arkivgatan 12.
Malmberget: J. Lalander.
Malmö: Börje Persson, Amiralsg. 36.
— Karl Österholm, Agnesgatan 7.
Mora: G. H. Johansson, S. J. 2.
Motala: C. Hallros, Bispmot. Handelstr.
Motjärnshyttan: Yngve Nordström.
Munkedal: J. A. Hansson.
Munkfors: Boris Ekvall, Bl. 297.
Mölnlycke: Eric Brandin, Ericstro.
Norrköping: J. Pihlström, S. Promen. 19.
Nybro: K. F. Lindqvist.
Nynäshamn: Ernst Ek, Stathmosv. 2.
Porjus: Ossian Lundberg, Postlåda 150.
Råda: Nils Anderwall, Basterud.
Råsunda: V. Appelkvist, Stråkv. 64, II.
Sandviken: Sven Wallner, Box 3124.
Sjoberga: Walter Johansson, Höjen.
Skara: Gustaf Nyqvist, Box 80.
Skutskär: Evert Kjellin, Stadsplan 91-4.
Slöinge: J. A. Nord.
Stenstorp: Hugo Sköld.
Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, 5 tr. Tel 31 65 01.
— Biblioteksbokhandeln, Biblioteksg. 12.
— Bokhandeln, Mästersamuelsgatan 62.
Strömsbro: Nils Larsson, Vretbacka.
Sundsvall: B. Rodin, S. Järnvägsg. 59.
Svedala: Henning Bengtsson.
Säffle: Evert Andersson, Furuvägen 29.
Södertälje: Eric Grahn, Algatan 23.
Tidaholm: Nils Brobeck, Bäcksg. 7.
Tierp: Gösta Eriksson, Box 600.
Torsby: Gunnar Svensson, Box 68.
Torskors: Frithiof Ahnfeldt, Inglatorp.
Trollhättan: Sven Nydén, Nygatan 2.
— Allan Hälls Pappers- & Musikhandel.
Trälleborg: O. Hj. Olsson, Repslagareg. 8.
Uddevalla: E. Dahl, Ridhusgat. 6.
Umeå: Åkerbloms Bokhandel.
Valdemarsvik: Alvar Carlsson, Box 66.
Varola: Sven Strand, Nykvarn, Törneshuset, Skövde.
Visby: Vessman & Petterssons Bokhandel, Adelsgatan 5.
Värtan: Gerhard Johansson, Järnvägen.
Västerås: G. Nilsson, Kryddgårdsgat. 12.
Åtvidaberg: Walter Söderqvist, Sunnebovägen 2.
Öbacka: Åkerbloms Bokhandel.
Örbyhus: Petrus Fredlund.
Örebro: Sigurd Ekendahl, Klostergat. 27.
Örnsköldsvik: C. E. Backlund, Nyg. 37.

L I V F Ö R S Ä K R I N G S B O L A G E T

BALDER

Grundat 1887



LIVFÖRSÄKRINGSBOLAGET
BALDERS FASTIGHET
STUREGATAN 8, STOCKHOLM

Ålder: Balder är Sveriges första rent ömsesidiga livbolag (rent ömsesidigt = utan förlagskapital).

Soliditet: Intet svenskt livbolag har starkare ekonomisk ställning än Balder.

Premier: Icke något livbolag kan uppvisa i genomsnitt lägre premier än Balder.

Vinst: Balders försäkrade ha erhållit större vinst och tidigare än i de flesta andra svenska livbolag. För en del äldre försäkringar har sammanlagda vinsten i Balder uppgått till 70 à 80 % av samtliga erlagda premier. Sådana resultat åsyfta specialfall och få ej betraktas som norm för bolagets vinstutdelning i allmänhet.

Försäkringsvillkor: Livförsäkring för vuxna utan läkareundersökning gälla i Balder genast till fulla beloppet vid dödsfall i alla akuta sjukdomar, således även vid epidemier. Dessa förmånliga villkor gälla utan begränsning till vissa försäkringar och visst belopp.

Konstitution: Balders försäkrade äga själva bolaget och äro de enda, som äga bestämmanderätt beträffande dess angelägenheter.

**Driftiga ombud
antagas**

FÖRSÄKRINGSSUMMA:
Cirka **220,000,000 kr.**
FONDER:
över **50,000,000 kr.**

Nobelpristagaren H. Sienkiewicz' mästerverk

QUO VADIS

Översatt till Esperanto av Lidja Zamenhof. Två delar. Inbunden i svart klotband. Pris per del kr. 6:—. (Delarna säljas icke var för sig.)

En spännande detektivroman av den berömde författaren IVANS

LA VIRO EL FRANCUJO

Inbunden i svart klotband. Pris kr. 6:—.

Förlagsföreningen Esperanto, Box 698, Stockholm 1

